

# BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher  
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5

decembro 1989



**33a GEFA-jarkunveno 6a ĝis 8a de oktobro 1989 en Verden/Aller**



Akcepto en la urbodomo

foto: E. Herlitze

### 33a jarkunveno de GEFA

La nordgermana urbo Verden/Aller gastigis de la 6a ĝis la 8a de oktobro 1989 membrojn kaj geamikojn de la Germana Esperanta Fervojiŝta Asocio (GEFA) okaze de ilia tradicia jarkunveno. Inter la 122 partoprenantoj, kiujn GEFA-prezidanto Gießner kore bonvenigis dum la festa aranĝo, estis gastoj el ses aliaj landoj. Ke GEFA serĉas jam de jardekoj la publikan intereson, pruvis la gazetara konferenco, Esperanto-ekspozicio, librostando, akcepto en la urbodomo, ĉeesto de reprezentantoj de fervojo kaj de Fervoja Sociala Organizo (BSW) kaj nelaste de la Germana Esperanto-Asocio kaj de la Esperanto-Ligo de Malsupra Saksio.

Dum la festvespero transdonis salutojn nome de siaj landaj asocioj s-ro de Sutter (Belgio), s-ino Birkbak (Danlando), s-ino Vonay (Francio), s-ro Bultmann (Nederlando), s-ino Fiechter (Svislando) kaj s-ro Pištor (Ĉeĥoslovakio). Pro tio ke ĉiu loto gajnis en la riĉe ekipita tombolo, la fakovrtara fonduso povis ricevi konsiderindan sumon. Folklore vestitaj paroj prezentis plaĉajn dancojn, precipe el nordgermanaj regionoj. Kiel kutime oni ofertis al la dancemuloj viglan muzikon ĝis noktmezo. Regis harmonio kaj amika etoso.

Dufoje kunsidis la GEFA-estraro kun la delegitoj kaj pritraktis temojn de abunda tagordo, i.a. la naciajn kaj internaciajn aranĝojn en 1989/90. La venonta GEFA-jarkunveno disvolviĝos kune kun najbaraj landaj asocioj en Belgio. GEFA transprenos la organizadon de la 44a kongreso de la Internacia Fervojiŝta Esperanto-Federacio (IFEFF), kiu okazos en 1992 verŝajne en Münster (Vestfalia). Rilate la varbadon GEFA eldonos novajn afiŝojn kaj informilojn, plibonigos la sistemon de la disdonado, publikigos raportojn en la distriktaj orga-

noj de la Fervoja Sociala Organizo, ofertas Esperanto-kursojn en fervojfakaj lernejoj kaj anoncas la telekurson. Post apero de esperantlingva fervoja terminaro en tiu jaro, nun estas preparata por germanlingvanoj la eldono de dulingva fervojfaka vortaro. Du kandidatoj finis sukcesplene la ekzamenon de lingva kapableco, kiun aparta ekzamenkomisiono de GEFA kontrolis. Gratulon al s-ino Wagner kaj s-ro Ullmann.

Dum la dimanĉa matineo prezidanto Gießner raportis pri la eventoj de la lasta jaro kaj alvokis la ĉeestantojn aktive kunlabori. Fariĝas pli kaj pli malfacile gajni junajn adeptojn de Esperanto inter la regresanta nombro de gekolegaj. Gitara orkestro kaj vira ĥoro ĝojigis per belsonaj kantoj kaj muzikaĵoj. Oni vidis diapozitivajn pri la projektita Esperanto-hotelo en Herzberg kaj spektis sonfilmon pri la turisma programo de la lasta IFEFF-kongreso en Salou kaj la postkongreso sur la insulo Majorko.

Ne mankis gvidita vizito al la vidindaĵoj en la 2000jara urbo. Precipe impresis la belaspektaj frontonaj domoj kaj la 500jara gotika katedralo. Aŭtobusa ekskurso kondukis al bone flegata parko apud la vilaĝo Walsrode, kie vivas ĉiuspecaj birdoj el la tuta mondo, precipe el ekzotikaj regionoj. En rustika restoracio enmeze de la parko allogis kafo kaj kuko la ekskursantojn.

Post lasta komuna tagmanĝo la kongresanoj adiaŭis kaj dankis sincere al la organizantoj pro ilia modela organizado. La elektita hotelo, iom malproksima de la stacidomo, bonege taŭgis kiel kongresejo kaj komforta tranoktejo. Pasis belaj tagoj en la „rajdista urbo Verden“. Espereble sukcesos ankaŭ la venonta renkontiĝo en Belgio. W. B.

### GEFA-Jahresversammlung in Verden/Aller

Den Mitgliedern und Freunden der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (GEFA) war das diesjährige Herbsttreffen eine willkommene Gelegenheit, ihre Sprachfreunde aus dem In- und Ausland wiederzusehen. Die Ausrichtung dieser Veranstaltung, die vom 6. bis 8. Oktober 1989 in Verden/Aller stattfand, übernahmen dankenswerterweise die Eisenbahner-Esperantisten des Bezirks Hannover. Die äußeren Umstände waren günstig. Fast alle Teilnehmer wohnten in einem komfortablen Hotel, allerdings entfernt vom Stadtzentrum.

Der Pressekonferenz folgte ein Empfang der Delegierten im Rathaus. Der stellvertretende Bürgermeister Pabst begrüßte mit besonderer Herzlichkeit die Gäste und informierte sie über die 2000jährige Geschichte der norddeutschen Stadt. Den Wünschen des Bürgermeisters für eine erfolgreiche Tagung schloß sich Herr Schulze vom Bezirksvorstand des BSW an. Den Abend verbrachten die meisten bei einem gemütlichen Zusammensein, während der Arbeitsausschuß zu seiner ersten Sitzung zusammentrat.



Den Samstagvormittag nutzten die Tagungsteilnehmer zu einem sachkundig geführten Rundgang durch die Altstadt. Vorbei an schön gestalteten Giebelhäusern ging es durch die Fußgängerzone zum mächtigen Dom der ehemaligen Bischofsstadt. Unterdessen beriet der Arbeitsausschuß unter Leitung seines Vorsitzenden Gießner über anstehende Angelegenheiten der Vereinigung. Hierzu gehörten u.a. kommende Veranstaltungen, Werbemaßnahmen, das zweisprachige Eisenbahnfachwörterbuch sowie die Absicht, den 44. Kongreß des Internationalen Verbandes der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF) 1992 in Münster (Westf.) abzuhalten. Frau Laudemann vom BSW-Hauptvorstand verfolgte mit regem Interesse die Diskussion und nahm die Gelegenheit wahr, allgemeine Informationen über die Lage des BSW zu geben. Zwei Kandidaten, Frau Wagner und Herr Ullmann, unterzogen sich der Esperanto-Sprachprüfung, die sie erfolgreich bestanden.

Höhepunkt der Jahresversammlung war der Festabend mit zahlreichen Gästen, die Herr Heimlich als Esperanto-Beauftragter des Bezirks Hannover herzlich begrüßte. Die Grüße der BD Hannover und des BSW-Bezirksvorstands überbrachte Prof. Dr. Jansen. Er anerkannte die vielfältigen Leistungen der Eisenbahner auf kulturellem Gebiet. GEFA-Vorsitzender Gießner hieß besonders die Ehrengäste willkommen, unter denen sich Herr Brünig von der Ortsstelle des Bahnhofs Verden befand, ferner die IFEF-Ehrenmitglieder Frau Kruse und Herr van Leeuwen, die Ehrenvorsitzende des Deutschen Esperanto-Bundes Frau Bormann, und Herrn Welling, den Vorsitzenden der Niedersächsischen Esperanto-Liga, die gleichzeitig ihre Jahrestagung im gleichen Gebäude abhielt. Auch benachbarte Landesverbände in Belgien, Dänemark, Frankreich, in den Nie-

derlanden, der Schweiz und der Tschechoslowakei ließen durch ihre Vertreter Grüße und Wünsche ausrichten. Die Landjugend Schafwinkel lockerte den Abend mit gefälligen Gruppentänzen, vorwiegend aus Norddeutschland, auf. Eine Tombola ohne Nieten erbrachte einen stattlichen Gewinn für das geplante zweisprachige Eisenbahnfachwörterbuch. Weniger Zuspruch fand leider der Bühnerstand. Dagegen wurde bei flotten Rhythmen eifrig bis Mitternacht getanzt.

Informationen und Kultur bot die traditionelle Matinee am Sonntag. GEFA-Vorsitzender Gießner eröffnete sie mit seinem Jahresbericht, der an anderer Stelle zu lesen ist. Die Gitarrengruppe Eckel spielte und sang deutsche und ausländische Volkslieder. Und der stimmungswaltige Männerchor aus Kirchlinteln erntete reichen Beifall für seine mehrstimmigen Lieder, vor allem in Plattdeutsch und Esperanto. Die Herzberger Esperanto-Gruppe zeigte Dias über das geplante Esperanto-Hotel. Zum Schluß rief Herr Barnickel mit seinem vertonten Film Erinnerungen an den letzten IFEF-Kongreß in Spanien wach.

Bleibt noch der Busausflug zum Vogelpark bei Walsrode zu erwähnen. Viele sahen zum ersten Mal diese einzigartige, gepflegte Parkanlage mit ihren zahlreichen Vögeln aus aller Welt. Wer dem trüben Wetter entfliehen wollte, ließ sich im rustikalen Cafe zum Imbiß nieder. Für die vorbildliche Vorbereitung und den reibungslosen Ablauf der Tagung gab es ein herzliches Dankeschön, das vor allem das Ehepaar Heimlich aus Soltau verdiente. Für die, die es noch nicht wissen: Das nächste Jahrestreffen wird zusammen mit einigen anderen Landesverbänden im Oktober 1990 in Belgien stattfinden. Einzelheiten werden demnächst im BULTENO bekanntgegeben.

W. B.

## Jarraporto

pri la periodo inter la 32a kaj 33a jarkunveno (1988/89)

### Enkonduko

La plej grava evento en tiu „jaro n-ro 2“ post la lingva jubileo sendube estis la finpretigo de la fervojo terminaro. Kvankam tio ja principe estas IFEF-afero, ĝi tamen tre intime tuŝas nian germanan asocion kaj meritas apartan mencion en ĉi-enkonduko. Detalojn vidu sub „kunlaboro kun IFEF“.

Kiel ĉiujare la morto kolektis sianjn viktimojn. Ni eksciis pri la morto de jenaj membroj:

Paul Keil (88) 1. 12. 88

Benno Passick (59) 29. 12. 88

Artur Benders (90) 14. 3. 89

Karl Koenemann (86) 27. 3. 89

Konrad Tasler (64) 25. 5. 89

Günther Bartz (58) 6. 6. 89

Alfred Schnetzer (80) 31. 7. 89

Ili havu eternan pacon!

Sed ni ne pretervidu, ke du el niaj membroj atingis benitan aĝon, nome Friedrich Busse fariĝis 85 (2.4.) kaj Robert Gräbener 80 (20.7.). Al ambaŭ ni gratulis. Kaj same ni gratulis pro la 75a naskiĝtago al nia multjara kunlaboranto Joachim Schrapf (30.8.).

## **Organizaj aferoj**

### **1.1 Membrostato**

La malplialtiĝo de la membronombro daŭris spite al klopodoj de kelkaj aktivaj membroj kaj funkciuloj. Ni anoncis al la BSW-ĉefestraro 431 individuajn membrojn (pasintjare 441). Al IFEF ni pagis por 638 personoj inkl. korporativajn membrojn. La severa personara politiko de la fervojoj, kiu intertempe kaŭzas malhelpaĵojn en la trafiko kaj konsiderindajn komplikajojn en la personara sektoro, pli kaj pli ŝarĝas la fervojistojn kaj grandskale forigas la intereson por aferoj, kiuj postulas iom da spirita streĉado kaj ne donas tujan utilon.

### **1.2 Kursoj**

La oferto pri kursoj ne pliboniĝis. Okazis nur du, inter tiuj unu pure fervojista, kiu finiĝis kun 6 partoprenantoj. La telekurso bone funkcias. Ni klopodis, per specialaj memorleteroj reaktivigi personojn, kiuj komencis tralabori la kurson sen findaŭrigi ĝin.

### **1.3 Funkciuloj**

Neniuj ŝanĝoj. La laborkonsilantaro (Arbeitsausschuß) kunvenis kun la komisiitoj en la jarkunveno Kaiserslautern (okt.) kaj en Würzburg (marto).

### **2. Kunlaboro kun IFEF**

De la 13a ĝis 19a de majo okazis la 41a IFEF-kongreso en Salou (Hispanio) kun 554 fervojistoj el 23 landoj. Partoprenis 73 germanoj. Re prezentis nin la komitatanoj Graß, Herlitze, Riehn kaj Ritterspach. Laŭ la nova IFEF-statuto, kiu validos ekde 1. 1. 90, oni elektis en Salou vicprezidanton, sekretarion kaj redaktoron. Post sepjara kunlaboro en la IFEF-estraro kiel sekretario nia membro Otto Rösemann demisiis. Kiel prezidanto daŭre funkcias Giessner. La du estraranoj partoprenis en estrarkunveno printempe en Budapeŝt kaj Giessner aŭtune en Bologna.

En 1989 IFEF povis festi sian 80jaran ekzistadon. Plej valora festodonaco estis la prezentado de la Fervoja Terminaro flanke de la Terminara Komisiono de IFEF. G. Ritterspach prezentis ĝin en la kongreso. Flanke de GEFA li kaj H. D. Hartig decide kontribuis al la fakto, ke tiu terminaro entute povis aperi. Kiel kutime la faka karaktero de la kongreso esits akcentita per fakprelego kaj aktualaj referaĵetoj fakaj. Kiel gvidanto de la Terminara Komisiono kaj ties redaktoro denove estis konfirmitaj Ritterspach kaj Hartig.

### **3. Aranĝoj, kontaktoj**

De la 7a ĝis la 9a de oktobro okazis la 32a jarkunveno en Kaiserslautern, en kiu partoprenis 63 personoj kaj gastoj el 4 landoj, krome la un-

uan fojon el Sovetunio. Multaj membroj kiel ĉiujare ĉeestis aranĝojn de aliaj asocioj, de GEA, UEA, IFEF-skisemajno en Mühlbach (A) ktp.

## **4. Informado, varbado**

### **4.1. Bulteno**

La subita morto de la presisto en septembro 1987 ne tuj havis konsekvencojn, ĉar liaj du kunlaborantoj ebligis la seninterrompan aperadon de „Bulteno“ ĝis numero 2/89. Sed en majo 89 la presejo provizore estis fermita kaj ni devis serĉi provizoran presejon (Grafika Centro Antwerpen), ĝis estis decidite, ĉu la ĝisnuna presejo derove funkcios. Fine de aŭgusto ni ricevis la informon ke la presejo definitive bankrotis. Ni rapide sukcesis trovi alian taŭgan presejon, eĉ en la sama urbeto Herzberg kun nomo „Druckerei und Verlag Erwin Jungfer.“ Tiel eblis, presi n-ron 4 jam en la nova presejo. Sekve povis aperi la kutimaj kvin numeroj kun entute 34 paĝoj (4 fotoj). Ni esperas, ke nun la normala eldon-ritmo de „Bulteno“ estos certigita.

### **4.2 Gazetaro**

En tagaj gazetoj, fakaj kaj sindikataj revuoj ni povis konstati 76 artikolojn pri nia agado. Daŭre en kelkaj distriktoj aperas efikaj artikoloj en „BSW-Mitteilungen“. Ankaŭ en la „Flavaj paĝoj“ kaj en „Wir“ estis publikigitaj informoj.

### **4.3 Informado, varbado**

Denove estis distribuitaj pli ol tri mil informiloj kaj kelkdekoj da afiŝoj. Okazis 5 ekspozicioj kun entute 12000 vizitantoj en Arbergen, Nürnberg, Offenbach, Schwelm kaj Stuttgart. Anoncitaj estis 4 sendaĵoj de radio, krome 7 fakaj prelegoj je diversaj okazoj. J. Giessner aranĝis teatro-turneon por la pola aktorino Jadwiga Gibczynska. Ŝi prezentis unuhoran monodramon „Ĉu la nepoj nin benos?“ en Kaiserslautern (jarkunveno), Darmstadt, Dortmund kaj Hamburg. Ŝi verkis la teatraĵon surbaze de libro „La lastaj infanoj de Oldrovalo“, tradukita de J. Giessner. Du fakajn prelegojn liveris niaj membroj Giessner kaj Ritterspach al simpozio en Strašnice (CS).

Laŭ demandilo de la ĉefestraro de BSW ni liveris detalan jarraporton kaj klarigojn pri nia agado. En la jarlibro de UEA denove troviĝas tutpaĝa anonco de DB, kiu informas pri prezfavori interesaj por eksterlandanoj. Ankaŭ en la DB-informilo „Inter-Rail“ daŭre aperas informoj pri „Pasporta Servo“.

Bedaŭrinde ĉiuj ĝisnunaj klopodoj, denove havis la ŝlosilon por pasaĝeroj en la horaro de DB, estis senrezultaj.



## 5. Emerituloj

La emerituloj ĉi-jare havis sian renkontiĝon en Frankfurt la 9an de septembro, sub gvidado de Elfriede Kruse. Partoprenis 28 personoj.

Kiel jam de multaj jaroj la kunestado estis granda sukceso, ne laste pro la ekzakta preparado kaj organizado kaj pro la financa subteno flanke de BSW, pro kiu ni aparte dankas.

## Perspektivo

Kiam mi legas la vortojn sub „Perspektivo“ en la pasinta jarraporto, mi devas konstati kun granda bedaŭro, ke mi ne povas diri ion alian. Neniel pliboniĝis la situacio. Kiel jam dirite sub 1.1, la personara politiko severe komplikigas la vivon de la fervojistoj. Tre oftiga la lokoŝanĝoj kaj al la faktoj, ke fervojistoj devas labori en granda distanco de sia loĝloko kaj devas kromlabori, sen ricevi kompensan liberan tempon, al tiuj faktoj malfavore influas la granda necerteco, ĉu laborlokoj malaperos, estos „forraciigataj“. Ĉio tio ne plialtigas la emon de la kolegoj aparte streĉiĝi. Aldoniĝas la multaj aliaj kaŭzoj, pri kiuj ni jam ofte skribis kaj diskutis. Pro tio mi jen vortvorte ripetas la finvortojn el mia pasinta jarraporto: Ne eblas vivteni organizon, kiam daŭre nur malmultaj aktivuloj streĉegas siajn fortojn, dum la aliaj restas indiferentaj, kvazaŭ la Internacia Lingvo ne koncernas ilin. Restos nenio alia, ol mobilizi ĉiujn aktivecojn, klarigi al ĉiuj membroj - **kaj tio estas individua tasko de ĉiu unuopulo** - ke necesas inversigi tiun tendencon kaj al tiri novajn adeptojn, precipe junajn. Diskutitio en la lokaj grupoj. Ĉiu, kiu legas tion, decidu helpi en tiu, momente plej grava tasko. De ĝia plenumo aŭ neplenumo dependos la vivo de GEFA.

kompilis: Giessner

## Jarkunveno 1990

La GEFA-jarkunveno okazos komune kun la jarkunvenoj de Anglio, Belgio, Francio kaj Nederlando en Spa (Belgio) de la 1.10. ĝis 7.10.1990. La aranĝo havos la nomon Internacia Fervojista Esperanto-renkontiĝo (IFER) kaj okazos en formo de feria semajno. Dimanĉon 30.9. posttagmeze la estraro kaj komisiitoj kunvenos por laborkunsido en Aachen kaj samvespere partoprenantoj por IFER veturos al Spa. La programo en Spa enhavos kulturajn prezentaĵojn, balon, ekskursojn kaj fakajn erojn. Detaloj sekvos. Jam nun notu la tempon por tiu alloga renkontiĝo.

GEFA

## Seniorentreffen in Frankfurt

Wiederum lud die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (GEFA) zum alljährlichen Treffen ihrer Senioren ein. Der Einladung nach Frankfurt am Main folgte am 9. September 1989 eine beachtliche Zahl älterer GEFA-Anhänger. Im eleganten Intercity-Restaurant im Hauptbahnhof wurden sie von Frau E. Kruse herzlich begrüßt. Leider mußten manche der Eingeladenen ihre Teilnahme wegen Krankheit oder wegen anderer Verpflichtungen absagen. Frau Kruse gab einen Überblick über Aktualitäten aus dem Esperanto-Bereich, plauderte aber auch über lokale Merkwürdigkeiten. W. Barnickel schilderte, wie die Frankfurter zu ihrer ersten Eisenbahn kamen, und E. Herlitze trug mit heiteren Gedichten zur allgemeinen Fröhlichkeit bei.

Dem gemeinsamen Mittagessen folgte ein Spaziergang durch den Anlagenring, vorbei an den Hochhäusern der Banken bis zur Alten Oper. Die Teilnehmer, die aus dem gesamten Bundesgebiet angereist waren, dankten Frau Kruse für die gelungene Veranstaltung und sagten ihre Teilnahme für das nächste Treffen in 1990 zu.

W. B.

## Esperanto-Fernkurs jetzt neu: Teil II

Esperanto ist eine internationale Sprache. Die Grammatik ist einfach und logisch; sie besteht nur aus wenigen kurzen Regeln. Es gibt keine Ausnahmen und Unregelmäßigkeiten.

Esperanto wurde für die internationale Kommunikation geschaffen.

Der neu aufgelegte Esperanto-Sprachkurs mit Lernbuch, Tonbandkassette und brieflicher Betreuung ermöglicht es, daß jeder zu Hause Esperanto lernen kann. Zeitpunkt des Beginns, tägliche Dauer, Umfang, Lerntempo kann jeder selbst bestimmen. Experten beraten schriftlich, individuell und nach jedem Lernschritt.

Kurskosten: Teil I 30,— DM, Teil II 40,— DM

Bestellung: Einzahlung auf das Postgirokonto 61 150—466 beim Postgiroamt Dortmund.

Empfänger: Joachim Schrapp, Schmittingheide 17 d, 4400 Münster (Westf.)

EDS-Anschrift: BSchule 440 Münster (Westf.).

## Nekrologoj

La 5an de majo forlasis nin surprize nia amiko

**Josef Ries (69)**

el la distrikto Stuttgart.

Nome de la distriktestro la anstataŭanto Gebhard Jocham partoprenis la entompiĝceremonion, deponis nome de nia asocio florkronon kaj kondolencis al la postvivantoj. Esperanto perdis simpatian kaj sindonan samideanon.

Denove multjara amiko forlasis nin. La 12.8.89 mortis nia kolego kaj amiko,

**Karl Simon (93).**

Kolego Karl Simon lernis Esperanton jam en la jaro 1928 ĉe nia iama kolego Michl Ehbauer kaj estis eble unu el la lastaj samideanoj kiuj lernis Esperanton, jam en la dudekaj jaroj de nia jarcento.

Kolego Simon ankaŭ revenis al la movado fervojista kaj UEA tuj post la milito kaj servis en Munkeno kiel UEA fakdeligito fervojista, deponis la milito ĝis la jaro 1982, do nur kiel 86-jarulo li retiriĝis. Grupo de lokaj samideanoj akompanis lian entombigon.

### Danksagung

Allen denen, die mir zum Tode meines lieben Mannes

**Konrad Tasler**

ihr Beileid zum Ausdruck gebracht haben, danke ich vielmals.

Elisabeth Tasler

3501 Söhrewald 3 (Eiterhagen)

### Interrail und Pasporta Servo - gemeinsam geht's besser

Das Interrail-Ticket der DB hat schon so manchen jungen Weltenbummler aus der Bundesrepublik auf preiswerte Weise durch Europa geführt. Für diejenigen, die nicht immer nur im Nachtzug schlafen wollen, gibt es einen ganz besonderen Service, auf dem im Interrail Prospekt 1989 hingewiesen wird: die Gastgeberliste der Deutschen Esperanto-Jugend, die als „Pasporta servo“ bekannt und beliebt geworden ist.

Die auf den „Pasporta servo“ bezogene Gestaltung des DB-Interrail Prospekts erfolgte unter maßgeblicher Mitarbeit von Mitgliedern der BSW-Esperanto-Gruppe Frankfurt.

Dieses Verzeichnis bietet mehrere hundert Adressen in über 50 Ländern von privaten Gastgeberern, die, in der Regel kostenlos, ein Quartier anbieten.

Voraussetzungen sind Grundkenntnisse in der internationalen Sprache Esperanto.

Gerade für junge Leute mit schmalem Geldbeutel ist der Pasporta Servo ein ausgezeichnetes Mittel für „anderes Reisen“. Ein privater Aufenthalt in der Familie bietet wesentlich intensivere Eindrücke vom Alltagsleben des besuchten Landes. Das unmittelbare Gespräch mit der Bevölkerung fördert das Verständnis für andere Kulturen.

Informationen sind erhältlich bei:

Deutsche Esperanto-Jugend, Rheinweg 15, 5300 Bonn 1, Tel. 0228/235898.

E. Kiefer

### Esperanto-Welt-Kongreß in Brighton Internationaler Kongreß mit Teilnehmern aus 60 Ländern ohne Dolmetscher-Anlagen

Das südenglische Seebad Brighton stand für eine Woche lang ganz im Zeichen der internationalen Sprache Esperanto: vom 29. Juli bis zum 5. August versammelten sich dort 2400 Esperanto-Sprecher aus mehr als 60 Ländern zu ihrem 75. Weltkongreß. Aus der Bundesrepublik reisten etwa 200 Teilnehmer an, darunter auch eine Delegation aus den BSW-Esperanto-Gruppen, Bezirk Frankfurt.

Thema war „Sprache und Gleichheit in internationaler Kommunikation“, wobei natürlich der Hinweis nicht fehlte, daß bislang von „Gleichheit“ keine Rede sein könne. Auf internationalem Parkett gewänne vor allem Englisch immer mehr an Bedeutung, was eine Benachteiligung anderer Sprachen und deren Sprecher bewirke. Esperanto wäre - als zweite Sprache für alle - die Lösung für dieses Problem. Zunächst, so der Vorschlag des Esperanto-Weltbundes, sollten internationale Organisationen wie UNO oder EG stärker Esperanto nutzen.

Neben der Arbeit am Kongreßthema bot die „Kongreß-Universität“ Möglichkeiten zur Weiterbildung. Wissenschaftler aus Ost und West referierten über ihre Fachgebiete, so sprach u. a. der Physiker Ingo Hofmann aus Dieburg zum Thema „Was kommt nach dem Atom-Zeitalter?“

Der Esperanto-Weltkongreß findet seit 1905 regelmäßig statt, nur unterbrochen durch die Weltkriege. In der Bundesrepublik gastierte



der Kongreß zuletzt vor vier Jahren in Augsburg; im nächsten Jahr werden sich die Esperanto-Sprecher in Kubas Hauptstadt La Havanna treffen.

E. Kiefer

### Mitteilungen

Die IFES-Veranstaltung 1990 vom 12. - 20. 1. findet in Südtirol statt. Die Vorbereitungen und die Durchführung hat Kollege Röder übernommen.

Die Vorbereitungen für 1991 haben der französische Landesverband und für 1992 die CSR, in Arbeit genommen.

Die nächsten IFEF-Kongresse finden statt: 1990 in Hamar/N, 1991 in Franzensbad/CSR, 1992 in Münster/Westf./D.

Für die GEFA-Jahresversammlung 1991 hat die BD Stuttgart nach Friedrichshafen zum 2. Wochenende im Oktober eingeladen.

Das Frühjahrstreffen des Arbeitsausschusses für Esperanto mit den Beauftragten ist für den 17.3.1990 in Fulda geplant.

Ebenfalls findet das Seniorentreffen in der 2. April-Hälfte 1990 in Fulda statt.

**Nova gvidanto de fervoja koresponda servo:** s-ro Georges Joly, 19 Rue Seguin, F- 69002 Lyon (IF-nr.5, paĝo 76)

### Aus den Gruppen

#### Bremen

Unter dem Titel „Lebendige Zeitung“ wurden am 8.11. ausgesuchte Artikel übersetzt, behandelt und zur Diskussion gestellt.

Die diesjährige Zamenhofffeier findet am 13.12. im Vereinsheim statt.

Die niederländischen Sprachfreunde haben für die Zeit vom 8. - 10.6.1990 nach Groningen eingeladen.

#### Essen/Duisburg

##### Duisburger Esperanto-Gruppe - immer aktiv

Jeden zweiten und vierten Dienstag treffen wir uns um 17.30 Uhr im Unterrichtszentrum des Duisburger Hbf. Zwischen sechs und fünfzehn Personen nehmen daran teil. Es wird überwiegend Esperanto gesprochen. Zum erstenmal haben wir ein Faltprospekt in einer Auflage von 200 Stück mit unserem Halbjahresplan herausgegeben.

Während einer Veranstaltung im Rahmen der „Duisburger Akzente“, stellte uns das Kulturamt der Stadt vom 5. - 7. Mai eine Marktbude kostenlos zur Verfügung, damit wir für Esperanto und unsere Gruppe werben konnten.

Vom 22. - 30. August war in Duisburg die 15. Universiade. In der „Kulturzeile“ vor dem Sta-

dion standen wir mit unserem gut ausgerüsteten Stand und mit einem weit sichtbaren Transparent an fünf Tagen und informierten Sportler und Besucher über Esperanto.

In einer Ausstellung in der Mercatorhalle „Arbeiterbewegung zwischen Geschichte und Gegenwart“, unter dem Motto „Wann wir schreiten Seit' an Seit'“, waren auch die Esperantogruppen von Düsseldorf und Duisburg vom 1. - 3. September mit einem gemeinsamen Stand vertreten.

Unter „Chinesische Kostbarkeiten“, eine Ausstellung vom 21. Juli bis zum 6. August im Niederrheinischen Museum, waren auch Geschenke, die Duisburger Esperantisten von Esperantisten aus der Stadt Wuhan bekommen haben.

Seit dem 14. August wird in einer Grundschule in Duisburg-Rheinhausen, in einer „Arbeitsgemeinschaft“ von Schülern und Schülerinnen der 3. und 4. Klasse, Esperanto unterrichtet.

Vorträge außerhalb der Gruppe:

Kolpingsfamilie: „Esperanto für alle Menschen - für alle Völker“. Lichtbund Niederrhein: „Esperanto - Tür zur Welt“. Gesellschaft für Deutsch-Chinesische Freundschaft: „Esperanto in China“. Literaturkreis: „Esperanto - Brücke zur Welt“.

R. Terjung.

#### Irako

Inter la urboj Kirkuko kaj Baijio en la nordokcidento de Irako estis inaŭgurata nova fervoja linio. Tiu 252 kilometrojn longa linio, kiu ekkonstruiĝis en 1983, estas planita por maksimumaj rapidecoj de 250 km/h en la pasaĝertrafiko kaj por 140 km/h en la vartrafiko.

#### Aŭstralio

Nova trajnanonca kaj telerega instalaĵo en Melborno: Prepare al la Ducentjara Jubileo de eŭropa koloniado estas efektivigitaj en Aŭstralio pluraj fervojaj projektoj. Fariĝis en Melborno, la regurbo de la federacia ŝtato Viktorio, jam antaŭ kelka tempo subtera fervoja ringo, kiu malŝarĝas la por la antaŭurba trafiko gravan stacion „Flinders Street“ (Flindra Strato) kaj per kiu la alvenantaj kaj forveturantaj personoj povas esti distribuataj je pluraj stacioj. La vasta antaŭurba fervoja reto de Melborno ampleksas 330 km da fervoj-linioj, 196 staciojn kaj haltejojn kaj ankaŭ 84 trakregojn. Sole en la stacio „Flinders Street“ estas ĉiutage ekspedataj proksimume mil trajnoj.

## Fervojaj novaĵoj

### La nova motortrajno de la Danaj Fervojoj en la pasaĝertrafiko

La Danaj Fervojoj aĉetas 100 novajn motortrajnojn por la nivelaltigo de la diversaj servoj. La maksimuma rapido de la novaj trajnoj atingos la 180 km-jn hore. Oni planas, ke la novajn motortrajnojn la fervojo trafikigos ankaŭ en la internacia trafiko de la jaro 1991 inter KÖBENHAVN kaj HAMBURG. La veturdaŭro malpliigos en tiu ĉi rilato unu horon.

### La tunelkonstruada plano de la Aŭstraj Fervojoj

La Aŭstraj Fervojoj planas la konstruadon de nova tunelo sub „SEMMEERING“. Laŭ la plano la tunelo komenciĝos en Semmering kaj kondukos ĝis „MÜRZZUSCHLAG“. La konstruadon de la tunelo oni komencos baldaŭ kaj ĝi daŭros dum 4 jaroj. Pro la favora descendo la grandŝarĝaj vartrajnoj povos trafiki per 100 km-a rapido kaj por trakcio oni devos uzi nur unu lokomotivon. La investado kostas 3 miliardojn da ŝilingoj. La nova tunelo signifas en la veturdaŭro 30 minutajn malpliigon. Ĉe la trakiado oni ŝparos jare 99 milionojn da ŝilingoj.

### La traknivelaj pasejoj de la Germanaj Fervojoj (DB)

La Germanaj Fervojoj (DB) 500 milionojn da markoj investas jare por la traknivelaj pasejoj. En la pasinta jaro oni sukcesis ĉesigi 65 tiajn pasejojn. Laŭ la statistikoj malpliigis la nombro de la akcidentoj: En la jaro 1970 okazis 793, en la jaro 1986 okazis 346 akcidentoj. La nombro de la traknivelaj pasejoj estis 29.000 en la jaro 1982 kiujn sukcesis malpliigi ĝis la fino de la jaro 1988 je 20.976.

### La memserva bariero de la Fervojo en FRG

La Germanaj Fervojoj (DB) eksperimentas per aplikado de memservaj barieroj ĉe la traknivelaj pasejoj. La eksperimentajn barierojn memfunkciigas la ŝoseo-trafikantoj. La bariero post ĉirkaŭ 1 minuta malfermita pozicio aŭtomate fermiĝas. Se proksimiĝas trajno, la malfermon

de la bariero mem la trajno aŭ la signalinstalaĵo malhelpas. (La novan memservan sekurecinstalaĵon kiel eksperimenton oni enkondukis sur la dutraka linio Köln - Kleve). Laŭ la favoraj spertoj sur la tereno de la fervojo direkto Köln oni muntis 6 memservajn barierojn.

### Novaj ununoktaj itineroj de la Aŭstraj Fervojoj

La Aŭstraj Fervojoj ekfunkciigis ununoktan vartrafikon en nova itinero. Laŭ la peto de la transportantoj la trafikanta ununokta trajno inter WOLFURT kaj GRAZ ekveturas el la stacio WOLFURT je la 18.10 horo, alvenas alitage mantene je la 6.55 horo en la stacio GRAZ. Inter la 2 finstacioj la vartrajno haltas nur en 5 stacioj.

### Eksperimentoj en la tunelo „SIMPLON“

Tra la Eŭropa tunelo — inter Francujo kaj Anglujo — oni planas transporti ankaŭ aŭto-trajnojn. La rapidec-eksperimentoj de la aŭto-trajnoj okazis en la tunelo „Simplon“. La tunelo „Simplon“ konsistas el 2 apartaj tuneloj, kiel estos ĉe la Eŭropa tunelo. La 2 apartajn tunelojn kunligas en difinitaj longoj kruc-tuneloj. La eksperimentojn oni faris dum 4 tagoj. Al la eksperimentoj la Svisaj Fervojoj donis 2 elektrajn lokomotivojn, la Francaj Fervojoj 9 pecojn da daetaĝajn varvagonoj, kiuj estis taŭgaj por la aŭto-transporto. La vagonojn oni ekipis per pasaĝervagonaj boĝioj kaj la trajnojn trakciis 2 lokomotivoj por ke oni povu atingi la 160 km-an rapidon. Al la eksperimentoj la necesajn aŭtojn certigis 85 svisaj fervojistoj, kiuj loĝis en la ĉirkaŭaĵo. Okaze de la eksperimentoj oni faris multajn mezuradojn ĉe la fermitaj kaj kruciĝantaj tuneloj. La mezurorezultoj plifaciligas la projekton de la Eŭropo-tunelo kaj de la trafikantaj veturiloj, kiuj trafikos en ĝi.

### Refunkciigo de ĉesigitaj stacioj ĉe la Anglaj Fervojoj

La Angla Fervojo denove funkciiĝas 150 staciojn el inter la pli frue ĉesigitaj stacioj kaj haltejoj. La refunkciigon proponis la lokaj magistratoj, kiuj pagos ankaŭ la elspezojn de la refunkciigo.

El: Hungara Fervojista Mondo

Redaktfino por n-ro 1/90 estas la 15. 1. 1990

Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝojigan Kristfeston kaj sukcesplenan Novan Jaron.

Herausgeber/eldonanto Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung/redakcio. Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr.7, Druck/preso: E. Jungfer, 3420 Herzberg am Harz